




La lastan tagon, la Helanodikoj, kiuj prezidis la ludojn, oferis grandan festenon ; la venkintoj ricevis laŭrkronon, verŝajne simbolantan, ke simpatias ilian venkon la fortoj de la Tero, kiujn la provoj eble elvokis. Kiam ili revenis en sian civiton, oni ilin entuziasme akceptis kaj kelkfoje starigis statuon de ili. Ili ĝuis grandegan prestiĝon, oni admiris en ili la tipajn kvalitojn de la dorianoj, invadintoj de la Peloponezo, tiujn de la Spartanoj, precipe iun individuan energion, cetere kunligitan kun aristokrata ideologio. La civitestraro mendis al poetoj, kiaj Pindaro, verkaĵojn por glori la venkintojn. Ankaŭ al la vazpentristoj tio provizis tre diskonatan temon.

Nur poste, dum la kvara jarcento a.k. la atletoj, fariinte profesiuloj, praktikis la sporton kun pli profitemaj celoj, kaj ilia prestiĝo dekadencis. Finfine, trans la partiĝoj kiuj kontraŭmetis la civitojn, Olimpio pli kaj pli fariĝis kunvencentro por ĉiuj Grekoj, eĉ por alilandanoj kaj tiel kontribuis almenaŭ provizore al la restarigo de neŭtraleco inter la malamikoj. Nuntempe, ĉiun kvaran jaron flamo estas ekbruligata en la stadio de Olimpio; jam en ilia tiam « panheleneco » ĝermis la nuna internacieco de la Ludoj.

M. Th. JUHAULT.

Poeziaĵo verkita de Sinjoro C.J. COPPENS, dum la lasta tago de lia somera restado en la kastelo Grésillon :

ADIAŬ

Kial estas mi malĝoja ?
Kial ploras la ĉiel' ?
Morgaŭ estos mi survoja,
Iros mi al nova cel'.

Morgaŭ multaj jam forestos
El gastama la kastel'
Kaj nur kelkaj, kiuj restos !
Tial ploras la ĉiel'.

Dum semajnoj ni kunestis
Kiel granda amikar',
Morgaŭ ĉiuj ni disiros
Per la trajn' aŭ trans la mar'.

Al prelegoj ni aŭskultis,
Ni rigardis al ekran',
Estis saĝaj ni kaj stultis
En diskut' sen iu plan'.

Partoprenis ni ekskursojn
Kaj manĝadis sub la ter',
Aĝlojn vidis ni kaj ursojn,
Sangigadis la veter'.

Konatiĝis ni kun multaj,
Amikiĝis ni kun malpli,
Forgesiĝos la plej multaj,
Kelkajn rememoros mi.

Ĉu denove mi ĉi tien
Iam venos en estont',
Aŭ ĉu iros mi alien' ?
Granda estas ja la mond' !

Pri ĉi tiuj belaj tagoj
Certe restos la memor'
Kaj pri la komunaj agoj
Ilo restas en la kor'.

Adiaŭos ni por ĉiam ?
Plene mankas ja la sci'.
Ĉu mi rerenkontos iam
Tamen kelkajn inter vi ?

Morgaŭ estos mi survoje,
Iros mi al nova cel',
Tial kantas mi malĝoje,
Tial ploras la ĉiel'.

C.J. COPPENS.